# LIGILO


DE

BRAZILA ESPERANTO-LIGO

N-ro 22 - APR/MAJ/JUN 1994

## KARA LEGANTO

Jen la tereno, kiun Brazila Esperanto-Ligo ricevis de la registaro de Federacia Distrikto. Ĝi situas en privilegia parto de Samambaia, satelita urbo planita por 330.000 loĝantoj.



La konstruaĵo, kiun ni starigos sur la tereno certe solvos definitive la demandon pri spaco ne nur por Ligo, sed ankaŭ por eventualaj internaciaj organizoj invitotaj starigi filion en Brazilo.

Oficiala organo de
BRAZILA ESPERANTO-LIGO
Caixa Postal 03625 70084-970 Brasília (DF) Telefone [061] 226-1298

Aperas trimonate
Redaktas BEL-Estraro

## ESTRARO DE BEL

| | |
|---|---|
| Prezidanto | Francisco Mattos de Oliveira |
| 1-a Sekretário | José Carlos Dorini Ramos |
| 2-a Sekretário | Wilson Álvares de Oliveira |
| 3-a Sekretario | Lício de Almeida Castro |
| 1-a Kasisto | Aymoré Vaz Pinto |
| 2-a Kasisto | Maria das Dores Góes |

### Kontrolkomisiono

Altino Araújo Vasconcellos
José Romão Filho
Paulo Ricardo Grazziotin Gomes

### Anstataŭantoj

Adolpho de Miranda Silva
Ismael de Miranda e Silva
Maria Isabel Botelho Ramos

## HELPAJ DIREKTOROJ

Adolpho de Miranda Silva
Carlos Maria
Cleto Galvão da Silva

## PREZIDANTO DE LA FEDERACIA KONSILANTARO

Ivaldo Alves de Souza

## KOMITATANO "A"

Symilde Schenk Ledon

# FONDAĴO ALMADA

Dum la dua ĉi-jara trimestro la jenaj donacintoj sendis monon al Fondaĵo Almada. Al ĉiuj ni tre dankas!

| Donacintoj | | Sumoj |
|---|---|---|
| Anápolis Esperanto-Klubo (*) | CR$ | 213.000,00 |
| Campinas Esperanto-Klubo | CR$ | 12.000,00 |
| Carlos Alberto Andrade (*) | CR$ | 12.000,00 |
| Carlos Caixeta Borges | CR$ | 40.000,00 |
| Carlos Fernando da Costa Alves (*) | CR$ | 11.000,00 |
| Cleusa Maria Leone Cezar (*) | CR$ | 9.500,00 |
| Denisar Arneiro (*) | CR$ | 30.000,00 |
| Denise Arneiro Deslandes (*) | CR$ | 11.000,00 |
| Denise Saraiva (*) | CR$ | 12.000,00 |
| Ecy da Silva Ferreira (*) | CR$ | 9.500,00 |
| Jorge Neves Cezar (*) | CR$ | 10.000,00 |
| José Pedro Milagres | CR$ | 6.050,00 |
| Kapiŝaba E-Klubo por Infanoj | CR$ | 30.000,00 |
| Maria da Guia Amorim (*) | CR$ | 8.000,00 |
| Marly de Oliveira Moyses (*) | CR$ | 7.500,00 |
| Neider Silveira Jatobá | CR$ | 8.000,00 |
| Sérgio B. Justo (*) | CR$ | 22.000,00 |
| Tobias Ferreira (*) | CR$ | 11.000,00 |
| Wilson Pereira Deslandes (*) | CR$ | 11.000,00 |
| Entute | CR$ | 473.550,00 |

Ni ankaŭ dankas al la jenaj BEL-anoj, kiuj sendis mondonacojn al la ĝenerala kaso:

| | | |
|---|---|---|
| Anonimuloj | CR$ | 336,24 |
| Cleber de Moraes Lemos (*) | CR$ | 26.955,00 |
| Eros Braga Biscotto | CR$ | 19.287,00 |
| Goreth Aparecida de Jesus Lima | CR$ | 6.000,00 |
| Haroldo Silva | CR$ | 19.920,00 |
| Maria José Schatz | CR$ | 6.000,00 |
| Regina Margarida Marques Lemos (*) | CR$ | 26.955,00 |
| Renato Brandão de Figueiredo | CR$ | 3.518,24 |
| Symilde Schenk Ledon | CR$ | 1.000,00 |
| Entute | CR$ | 109.971,48 |

(*) Ĉiumonataj donacintoj.

# NIA MONDO

ESPERANTO EN FAKULTATO
Laŭ revuo "Starto", de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, jam la 3-an jaron oni instruas E-on en Pedagogia Fakultato en urbo Hradec Králové. La kurso estas ĉefe destinita por instruistoj de la supera lernejo.

ESPERANTO POR HOMEOPATOJ EN VENEZUELO
Ligilo ricevis cirkuleron nomita "Novaĵo el Venezuelo" el kiu ni transkribas la jenan informon: "La Venezuela Asocio de Homeopatoj kaj la Venezuela Lernejo de la Homeopata Medicino, ĉar multaj homeopataj revuoj publikas artikolojn kaj resumojn en Esperanto, kaj ĉar aliaj homeopataj lernejoj instruas la internacian lingvon decidis komenci la instruadon de la Internacia Lingvo Esperanto, kiel nedevigan studobjekton ekde la 1-a de januaro de 1994".

AKADEMIO DE ESPERANTO
"La stato kaj estonteco de la internacia lingvo Esperanto" estas temo de kolokvo, kiun Akademio de Esperanto (AdE) okazigos en Prago (Hungario), de la 7-a ĝis la 14-a de julio. Dum la kolokvo estos preparita riĉa kultura kaj turisma programo por akompanantaj personoj, parte komune kun SAT-antaŭkongreso. Post la kolokvo eblas aliĝi al lasta parto de la antaŭkongreso por ekkoni Pragon kaj/aŭ daŭrigi sian programon partoprenante SAT-kongreson en Strásznice, kaj eventuale la flugkaravanon al 79a- UK en Seulo kaj en Japanio.

UNESKO- UNICEF- PEN
1993 estis rikolta jaro por Esperanto. La Ĝenerala Konferenco de Unesko akceptis novan rezolucion pri Esperanto, je la 16-a de novembro. La antaŭaj rezolucioj okazis en 1954 (Montevideo) kaj 1985 (Sofio) . Ĉi-foje ĝi konkretiĝis en Parizo, kie Esperanto-Radikala Asocio - el Radikala Partio (Italio) grave rolis. Krom tio, UNICEF establis konsultajn rilatojn kun UEA. Fine, la tutmonda verkista asocio PEN Internacia aprobis la aliĝon de Esperanta PEN-Centro, kiu kunigas profesiajn esperantajn verkistojn. PEN Internacia estis fondita en 1921, el kies famaj membroj ni citas la jenajn: Alberto Moravia, Arthur Miller, George Bernard Shaw kaj Mario Vargas Llosa. Esperanta PEN-Centro, kiu nombras 21 membrojn, estis fondita en 1991 de Perla Martinelli, Giorgio Silfer kaj la nuna prezidanto, István Nemere.

HOMARANISMO
Laŭ aperis en la revuo Esperanto januaro/94, Info-Servo (Bismarckstr.28, DE-35037 Marburg, Germanio) preparas Tutmondan Homaranisman Adresaron por ebligi kontakton inter ĉiuj interesiĝantoj pri homaranismo.

INSTRUAJ INICIATOJ EN ITALIO

Rezulte de la insista agado de "Esperanto-Radikala Asocio", la itala eduk-ministerio starigis komisionon por studi la enkondukon de Esperanto en elementaj lernejoj kiel propedeŭtika ilo kaj kiel lernobjekto en si mem. La 13/membra komisiono, konsistanta parte el e-istoj (U.Broccatelli, A.Chiti-Batelli, G.Pagano, M.Sola) devos prezenti raporton antaŭvideble meze de 1994.

La sukceso de alia propono (de Mario Sola), pri eksperimenta E-instruado en po unu-du liceaj klasoj en EK-landoj, kun posta kunveno de kursanoj en Italio, dependos de respondo de eduk-instancoj en Hispanio, Valonio(Belgio) kaj Nordrejn-Vestfalio (Germanio), al kiuj la itala ministerio sianome plusendis la proponon.

90 JAROJ DA ESPERANTO EN BERLINO

En 1993 Esperanto-Ligo de Berlino fariĝis 90-jaraĝa! Ĝi estas unu el la plej malnovaj esperantaj organizoj en la mondo. Germana Esperanto-Asocio aperis nur post 3 jaroj. De la komenco ĝis la reuniĝo de Orienta kaj Okcidenta Germanioj ĝi alfrontis multajn problemojn pro du mondmilitoj, atakoj de faŝistoj kaj malpermeso dum okupacio far de Sovetunio. Tamen ĝis nun ĝi rezistis kaj sendube meritis la omaĝon de 171 esperantistoj el 8 landoj, kiuj partoprenis la 90-an detrevenan feston la 27-28-an de novembro .

AGO-TAGO

La 12-an de oktobro 1993 okazis Esperantaj agoj tra la mondo, samkiel en la 10-a de oktobro 1992. Tiaj publikaj agoj estas tre variaj, nome publikaj manifestacioj, disdono de flugfolioj, enketoj, marŝado ktp. Pere de ili oni intencas veki la atenton de ĉiuj ajn homoj al E-o. Ni ne scias ĉu en Brazilo okazis io tiurilate. Tamen ni proponas, ke ĉi-jare ankaŭ nia lando partoprenu tiun eventon. Do pritraktu la aferon kun viaj klubanoj kaj atendu la informon pri la dato de Ago-tago por 1994, ĉar kompreneble ĉiuj agoj devas okazi en la sama tago. Gravas ke ni adekvate elektu kion fari, laŭ la nombro de partoprenantoj. Surstrata marŝado de kvar/kvin homoj estas ridinda, dume eĉ unu nura preleganto en Universitato povas rezulti pozitivan efikon. Sugestoj estas bonvenaj!

TURISTA GVIDFOLIO EN EDIMBURGO

Esperantlingva gvidfolio por turistoj nun haveblas pri la Canongate-kirko en Edimburgo. Ĝi situas apud la Palaco de Hollywoodhouse, la loĝejo de la Reĝino kiam ŝi vizitis la skotan ĉefurbon. (El La Brita Esprantisto)

28-a ILEI KONFERENCO

Tuj post la Universala Kongreso en Seulo, okazos la 28-a Ilei-konferenco kaj la 3-a Gimnazio de Ilei, en Universitato Kangnam situanta 30 kilometrojn for de la koreia ĉefurbo. La temo: "La azia kontribuo al tutgloba edukado kaj kulturo". La evento inkluzivigas viziton al la unika folklora subĉiela vilaĝa muzeo, kie ĉiuspecaj tradiciaj artformoj (ceramiko, dancado, manlaborado ktp.) estas demonstrataj en aŭtentika etoso.

KSENOFOBIO - kaŭzoj kaj rimedoj

Estas la grava kaj aktualeca temo pritraktota dum la Internacia Esperanto-Konferenco 94, okazonta en Homburgo, Sarlando/Germanio, de la 16-a ĝis la 23-a de julio. La tuta programa de IEK-94 enhavas lingvokursojn, ekskursojn kaj atribuon de premio far de OSIEK-Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj.

SKOLTA MONDO
Okaze de sia 75-a jariĝo, Skolta Esperanto-Ligo eldonis pasintjare specialan jubilean numeron de sia organo "Skolta Mondo". Laŭ SEL vi povas ricevi la gazeton kontraŭ du internaciaj respondkuponoj, mondonaco (uea-konto: selx-m) aŭ eĉ senpage, skribante al la redaktorino: AM Ritamäki, Peltolavägen 6 B 36, FIN-20720 ÅBO, Finnlando.

Pasintan jaron okazis en Pollando la XI Tut-Pollanda Renkontiĝo de Pliaĝaj Geskoltoj. Laŭ la revuo "La Skolta Mondo", la evento estis tre internacia ĉar la renkontiĝon partoprenis geskoltoj de 12 landoj. Entute estis 2.500 partoprenantoj. Ankaŭ Skolta Esperanto-Ligo ĉeestis. SEL nur bedaŭras, ke reage al ĝia peto al la naciaj reprezentantoj en la tuta mondo, nur kvar sendis materialon pri SEL-agado en siaj koncernaj sekcioj.

NOVA ADRESO EN STOCKHOLM
Esperanto-Centro en Stockholm, kune kun Sveda Esperanto-Federacio (SEF), Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo (SEJU), La Espero (membrogazeto) kaj Kvinpinto (junulara membrogazeto) havas novan adreson: Esperanto-Centro, Vikingagatan 24, S-113 42 Stockholm, Svedio.

TAKE-ESPERANTO EN TELEVIDO
De Franca Esperantisto ni transkribas la jenan noticon: Francis Guthleben, ĵurnalisto ĉe "Canal E", perkabla televidstacio pri ekonomio en la orientfranca departemento Haut-Rhin - la sola nur-ekonomia televidkanalo en Francio -, intervjuis dum dek minutoj Jean Pierre Cancel, sekretario de TAKE-Esperanto kaj Edmond Ludwig, redaktoro de la revuo "La Domo" kaj prezidanto de Orientfranca Esperanto-Federacio. La celpubliko (50 000 spektantoj) estas la entreprenoj de la departemento kaj ties klientaro. "Canal E" akceptas dissendi bonkvalitajn mallongajn vidkasedojn pri Esperanto kaj prezenton de entreprenoj laborantaj per Esperanto. Sendu ilin al TAKE-Esperanto, rue de Tiefenbach, F-68920 Wintzenheim, Colmar, Francio. En "La Domo", la internacia revuo de TAKE-Esperanto, profesiuloj pri domkonstruado (ekde la elpensado ĝis la interna kaj ekstera aranĝado de domo) rilatas inter si kaj konsilas siajn klientojn kvarfoje en la jaro pri konstruaj teknikoj kaj reklamado, same kiel pri produktoj kaj novaj ideoj pri dekoraciado.

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA
KCE estis fondita en 1968, kiel asocio kun interalie la sekvanta celo: organizi kursojn, seminariojn, kolokvojn kaj kulturajn aranĝojn. Jam en 1974, KCE instaliĝis en la urbo La Chaux-de-Fonds (Svislando). De 1974 kaj ankoraŭ nun okazas ĉe KCE interesaj kaj altnivelaj aranĝoj plej diversaj. Por la trimestro aprilo-junio/94 jen la programo: 13-15 aprilo - Antaŭkolokvo al la Interlingvistika Simpozio en CDELI; 16-17 aprilo - Interlingvistika Simpozio en CDELI; 21-23 majo - Renkontiĝo por Migremaj Esperanto-Familioj kaj Naturamikoj; 25-26 junio - Ciklo pri la literaturo, lingvo kaj historio de E-o: Homaranismo de L.L. Zamenhof, Mondanismo de Hector Hodler (UEA) kaj Sennaciismo de Lanti (SAT); 25-25 junio - Manĝi laŭteorie kaj praktike (fiziologiaj aspektoj de nutrado kaj la diferenco de nutrado en riĉaj kaj malriĉaj landoj)

# TRA BRAZILO

BARRA MANSA (RJ) - En tiu urbo okazis la 17-a Renkontiĝo de Sudparaiba Valo, en la 5-a de Junio.

BRASÍLIA (DF) - La agema grupo Taguatinga Esperanto-Klubo lanĉis sian bultenon, nomita "Blanka Birdo". La titolo estas ĝuste la traduko de la indiĝena vorto Taguatinga. La unua numero temas ĉefe pri la fondo de TEK, starigo de E-aj kursoj kaj movadamaj agoj de la grupo dum preskaŭ unu jaro da ekzisto. "Blanka Birdo" estas trimonata kaj bonaspektas.

CAMPOS (RJ) - Plia trimonata bulteno debutis en brazila Esperantio. Ĝi nomiĝas Nova Sento kaj estas la oficiala organo de Campos Esperanto-Klubo. Dulingva, multkolora kaj bonaspekta, la nova periodaĵo enhavas noticojn lokajn kaj fremdajn kaj variajn rubrikojn.

DUQUE DE CAXIAS (RJ) - Esperanto Grupo "Tiago Apóstolo" ekorganizas sian bibliotekon, kaj pere de la bulteno "Saluton! Gesamideanoj" informas, ke akceptas kiujn ajn esperantajn verkojn. La adreso de la grupo estas Av. Duque de Caxias 491, CEP 25070-070.

JUIZ DE FORA (MG) - Universitata Esperanto-Movado estis fondita de lernantoj de beletra kurso. UEM intencas diskonigi E-on ne nur tra universitata medio, sed ankaŭ en la tuta urbo kaj ĉirkaŭa regiono. Krome, la fondintoj provos verki kaj traduki librojn, krei muzikistaron kaj teatrogrupon. Tion informis nin, perletere de la 3-a de Aprilo, la UEM-vicprezidanto Marcello Antonio Borges Varandas. Ligilo deziras plenan sukceson kaj restas je la dispono de UEM por diskonigi la rikolton de tiu junula entuziasma semado.

MACEIÓ (AL) - Ekde Junio aperis la bulteno de Esperanta Departamento de Spirita Frateco "Bezerra de Menezes". Ĝi nomiĝas La Foko, t.e. "novulo rilate al sia laboro, la komencanto rilate al sia ofico" laŭ redakteja ĵargono. Dulingve "La Foko" pritraktas kaj Esperanton kaj Spiritisman Doktrinon.

NOVA FRIBURGO (RJ) - De la 20-a ĝis la 22-a de Majo, Friburgo Esperanto-Grupo (FEG) okazigis la 8-an Renkontiĝon de Ŝtato Rio de Janeiro, sub aŭspicio de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro (AERĴ). Ĉeestis proksimume 50 homoj. Dum la evento oni diskutis la temon "La Graveco de Metodologio en la Instruado de Esperanto". Prof-ro Aloisio Sartorato prezentis la sub-temon "La Ĉefaj Trajtoj de la Esperanto-Instruisto", Prof-ro Jair Salles la sub-temon "Kiel Praktiki la Konversacion" kaj Prof-ro Sylla Chaves "La Graveco de Metodologio en la Instruado de Esperanto".

PARAÍBA DO SUL (RJ) - Prof-ro Luiz Alberto de Oliveira Coelho estas la nova Regiona Deligito de UEA por ŝtatoj Espírito Santo, Minas Gerais kaj Rio de Janeiro. Lia enposteniĝo okazis dum la 16-a Renkontiĝo de Esperantistoj de Sudparaiba Valo, en la urbo Guaratinguetá (SP), la 13-an de marto. Ĝis tiu dato respondecis pri la tasko S-ino Denise Arneiro Deslantes. BEL-estraro gratulas la du agemajn esperantistojn.

PORTO ALEGRE (RS) - "La 14-an de Julio 1947. Kun ĉi-tiu dato ekaperis en Porto Alegre mimeografita E-bulteno 6-paĝa kiel oficiala organo de Esperantista Societo de Porto Alegre, fondita antaŭ du jaroj ĉe la fino de la Dua Mondmilito. Pro financaj kialoj la bulteno unuafaze ne sukcesis transpasi la 12-an numeron. Duan fazon de ekzisto ĝi travivis inter 1979 kaj 1984 -laŭgrafike kaj -enhave plibonigita, fariĝanta unu el la plej konataj E-periodaĵoj en la lando. Trian fazon ĝi ekspertas ekde nun: denove ekbrilas "Suda Stelo", kies ĉefa celo estos respeguli la vivantecon kaj agadon de nia esperantista societo kaj kontribui laŭ ĝiaj ebloj kiel manifestaciilo de nia esperantisteca mondpercepto". Jen la enkonduko verkita de la redaktoro César Dorneles Soares por la unua numero de "Suda Stelo" (Majo/Junio-1994) , en ĝia 3-a fazo.

La 18-an de junio, 19:30 h, komenciĝis ĉe ESPA tiu, kiu certe fariĝos la plej profunda studado de la zamenhofa lingvo, iam realigita en Porto Alegre: temas pri la "Gramatika Kurso", okazonta en la unua kaj la tria sabato de la montato, sub la kunordigo de instruisto César Dorneles Soares, kaj havanta "Plena Analiza Gramatiko de Esperanto"-n kiel studilon. (Transkribita el "Suda Stelo" n-ro 2)

RIBEIRÃO PRETO (SP) - Dum la monato Aprilo, Prof-ro Atilio Orellana Rojas gvidis bazan Cseh-Kurson por 65 gelernantoj en 3 grupoj. Tri gazetoj anoncis la eventon, okazis brodkasta intervjuo kaj Tv-Ribeirão prezentis raporteton. Du firmaoj monhelpis, la unua pagis la ŝildojn, kraŝaojn kaj aliĝilojn, dum la alia pagis la flugbileton Argentinio/Brazilo/Argentinio de Prof-ro Atilio. La Cseh-Kurso ankaŭ okazis en la urbo São Paulo, por 165 partoprenantoj en 7 grupoj. Kultura Esperantista Centro de Ribeirão Preto respondecis pri tiu profita iniciato.

SÃO PAULO (SP) - Je la 17-a de Aprilo, en la sidejo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, oni fondis tre gravan fakan organizaĵon, Brazila Komitato de Esperanto-Instruado. El tiurilata invitletero ni ĉerpis la jenon: "La grupo estos de Esperanto-instruistoj, kiu strebos en la prilaborado de la instruado de Esperanto. Ĝenerale la esperanto-instruistoj havas nenian pedagogian preparadon antaŭ ol sin proponi por instrui la lingvon. Se hazarde li/ŝi estas jam kompetenta instruisto, bone por nia lingvo, kontraŭe oni katastrofe disvastigas la lingvon, idealon kaj malhelpas estontajn bakiĝojn de novaj esperantistoj. Kial niaj lernantoj malaperas? Ĉu nur pro iliaj propraj malplezuroj kaj disreviĝoj personaj rilate al Esperanto? Ni ne pensas tiel, certe grava kaŭzo povas esti nia propra mispreparo por instrui." Kune kun la fondo oni elektis la unuan estraron, kiu konsistas el Prezidanto: Euclides Carneiro da Silva; Sekretario: Adonis Saliba; Kasistino: Denise Vaz Bruno. Laŭ propono de BEL-estraro kaj aprobo de la kunfondintoj, BKEI agados sub la aŭspicio de Brazila Esperanto-Ligo.

# BEL-ANGULO

## 2-a ARGENTINA SEMINARIO DE ESPERANTO

Okazis de la 31-a de Marto ĝis la 3-a de Aprilo, en Buenos Aires. Ĝia ĉeftemo estis "La rolo de Esperanto en Ameriko". S-ino Symilde Schenk Ledon reprezentis BEL-on. Ni dankas ŝin pro tio kaj pro la de ŝi sendita jena raporto: Tre agrabla akceptado flanke de la organizantoj kun amikeca etoso, la relativa malmultnombraj ĉeestantoj partoprenis de la programeroj en malhasta ritmo, kies ĉefaj kunvenoj temis pri kunsidoj de Argentina Esperanto-Ligo, dum kiuj en Asembleo estis elektita nova estraro, kies prezidanto (anstataŭe al Rodolfo G. Calógero) Silvia E. Rottemberg kun sama posteno en Bonaera Esperanto-Asocio; prelegoj de Clara de Hess ("Vizito al Bona Espero"), Luisa Kohen ("Kibernetika Pedagogio"), G. Ledon ("Klerigo por la 21-a Jarcento"), S.S. Ledon ("Influo kaj Rezulto de Delegitreta Agado en Sud-Ameriko"), Atilio O. Rojas ("Esperanto en Ameriko"). Post la du lastaj prelegoj daŭrigis la Amerika kunveno kun samentena motivo kie estis prikonsiderataj la eblecoj de interrilatiĝo Sudamerika kiel unua paŝo por sekva pliampleksiĝo al tuta Latinameriko. Raporto kun skiza laborplano atingos UEA por determino de baza ekagado kies starto efektiviĝis dum la Seminario. Krom Argentino, partoprenis reprezentantoj de Venezuelo kaj Brazilo, nome de kiu por Brazila Esperanto-Ligo salutis Symilde S. Ledon, Komitatano A kaj Ĉefdelegito. Du koncertoj regalis la partoprenantojn (Elma Rojas kaj Teresita Alaniz) krom la amuza kaj kolora maskbalo je la adiaŭo. Dimanĉe, lastmatene, torenta pluvo malhelpis la promenon al Tigre. Notindas la kvalita enhavo de la dokumentujo: programo, cirkulero pri temoj seminariaj (ideoj, celoj kaj sugestoj), artikolo pri ekologio, 8 ĵurnalaj noticoj pri Esperanto, urba mapeto, porpaca karto, poezioj "La Tagiĝo", "Preĝo", himno "La Espero", Rezolucioj de Unesko, la libro "La Paperoj de Wappers" kaj n-ro 2/94 de "Argentina Esperantisto", 12-paĝa revuo, organo de LAE, aligitaj al UEA ekde 1946.

## BEL GRATULAS OKDEKJARAN PIONIRON

Frank Buckley, angla advokato kaj Esperanto-pioniro, festis sian okdekjariĝon la 16-an de Junio. Kiam li atingis 70 jarojn, oni organizis interesan propagandan ekspozicion en lia urbo, Bristol (Anglio), pere de pli ol 300 naskiĝtagajn gratulajn kartojn ricevitaj de li el multe da landoj. Frank Buckley estas verkisto de serio da komediaj teatraĵoj, komponis kantojn, reĝisoris kaj prezentis programojn ĉe Universalaj Kongresoj kaj internaciaj kunvenoj, prelegis en multaj esperantaj grupoj tra la mondo. Al tiu fekunda okdekjaraĝulo BEL sendis poŝtkarton kun gratuloj de la esperantistoj de Brazilo.



## BRAZILO EN UEA-RAPORTO

De la "Raporto de la estraro de UEA pri la agado en la jaro 1993" ni transkribas la jenajn erojn:

*Delegita Reto: La Jarlibro 1993 listigis 2 272 individuojn en 87 landoj, te. je 9 malpli ol en 1992. Estis 1 156 (lokaj) delegitoj, 174 vicdelegitoj, 1.653 fakdelegitoj kaj 88 junularaj delegitoj. Plej forte reprezentitaj estis Brazilo (284 indidivuoj en 81 lokoj), Germanio (206 en 152), Francio (190 en 147) kaj Usono (119 en 93).*
*Aliaj informoj kaj eksteraj agadoj: M. Bijleveld laboris, kun subteno de UEA, por veki intereson pri tutmonda kampanjo por Esperanto ĉe ekologiaj asocioj, bedaŭrinde sen granda reeĥo. Ankaŭ U. Grattapaglia energie aktivis en Brazilo por la prezento de Esperanto ĉe ekologiaj kaj aliaj tutmondismaj kongresoj, same kun la apogo de UEA...*
*Ameriko: En Brazilo okazis la ĝis nun plej granda nacia kongreso (ĉ. 500 partoprenantoj). Daŭras la entuziasma laboro de kubaj esperantistoj, pri kiu persone informiĝis surloke la komitatano D. Blanke. En junio Atilio Orellana Rojas (Argentino) prelegis kaj instruis Cseh-metode en Bolivio kaj Brazilo...*

## PLIRIĈA LIGILO

Esence, LIGILO estas vehiklo pere de kiu la estraro de BEL komunikas sin kun la anaro. Ĝi ne estas distra, lerniga aŭ kultura publikaĵo, kiel ekzemple estis Brazila Esperantisto. Ĝi estas nur informilo, do multe dependas de noticoj, raportoj, novaĵoj. Iom post iom nia interna bulteno pliboniĝas dank'al kelkaj BEL-anoj, kiuj regule sendas informmaterialojn al ni. Niaflanke la strebo por pli bone regi la komputilajn rimedojn por la kompostado estas konstanta celo. Tamen ni konscias, ke LIGILO povos fariĝi pli tutlanda. Tio okazos, se ĉiuj grupoj aŭ individuoj sendos informojn pri la loka esperanta agado, ĉar ĉiaj aranĝoj aŭ eventoj eblas fariĝi noticoj por LIGILO. Tamen atentu, ke pli alloga ol anonco estas konciza raporto tuj post la evento. Do ne hezitu, sendu resumon pri renkontiĝoj, seminarioj, studrondoj, kunfratiĝa festo, kultura kunveno, balotado k.t.p. Ne forgesu, ke fotoj, simboloj kaj desegnoj igas la publikaĵon pli riĉa kaj ĉarma.

## NE ESTU ANONIMULO !

Fojfoje BEL-kasisto konstatas, ke iu deponis monon en nian bankkonton ĉe "Banco do Brasil" sen iu ajn plia informo. Kvankam la plej grava aspekto de la afero jam estas solvita t.e. la enkasigo de la mono, la depono sen avizo malebligas ĝustan librotenadon kaj kaŭzas ĝenigan problemon, ĉar pro manko de kompleta informo la kasisto jam sendis leterojn pri ŝuldo al tiuj deponantoj. Do nepre informu nin kiom, kiam, kial kaj kiel vi sendis monon al BEL. Aliflanke, kaze de poŝtmandato, ĝi devas esti ricevebla pere de agentejo "Rodoviária" kaj devas enhavi la informon por kio destinas la mono.

# AGENDO




01-08 MAJO 94 Strasburgo (Francio)
TEJO-Seminario en Strasburgo

20-22 MAJO 94 Nova Friburgo (RJ)
8-a Esperanto-Renkontiĝo de Ŝtato Rio-de-Ĵanejro

05 JUNIO 94 Barra Mansa (RJ)
17-a Renkontiĝo de Sudparaiba Valo

10-15 JULIO 94 Natal (RN)
30-a Brazila Kongreso de Esperanto
15-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso
4-a Infana Kongreseto




23-30 JULIO 94 Seulo (Koreio)
79a Universala Kongreso de Esperanto




04 SEPTEMBRO 94 Barra do Piraí (RJ)
18-a Renkontiĝo de Sudparaiba Valo

26-27 NOVEMBRO 94 Lorena (SP)
17-a Renkontiĝo de Ŝtato San-Paŭlo

BRAZILA ESPERANTO-LIGO
Cx. Postal 03625 Telef (061) 226-1298
70084-970 BRASÍLIA - DF BRASIL

**IMPRESSO**